
# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 6 (885) • 2010 •

DIA REGNO

ISSN 0167-9554



La naskiĝo de Jesuo Kristo – laŭ Doré

**KELI**
**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*



**Prezidanto**: Philippe COUSSON
✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021;
💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel POLNICKÝ;
✉ Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio
✆ +420 325 615 651; 💻 cea.polnicky@quick.cz

**Kasisto**: Siegfried KRÜGER
✉ Claudiusweg 10,
DE 74074 Heilbronn, Germanio
✆ +49 7131 162688;
💻 siegfriedkrueger@arcor.de



**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI ĉe ING Bank N.V.: 5506132. Kontonomo: INT CHR ESPERANTO BOND - KELI - BIC: INGBNL2A; IBAN: NL86INGB0005506132

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

**DIA REGNO**

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
✉ Västergårdsg 15; 256 64 Helsingborg; Svedio;
✆ +46 (70) 2004574; 💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Éva FARKAS -TATÁR

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec


## ENHAVO


| | |
|---|---|
| La malfacila vorto "amo" | 123 |
| Bele maljuniĝi | 124 |
| Pri rusaj naciaj simboloj | 125 |
| Teilhard de Chardin | 127 |
| Skizoj pri filozofoj - kuracistoj IV | 129 |
| 1a listo de aliĝintoj al kongreso | 131 |
| La frua kristanismo – speciale en Nord-Afriko | 132 |
| "Voj-kirkoj" | 138 |
| E-vid-e-nt-e ankoraŭ ne ripozas | 139 |
| Protokolo de la jarkunveno | 140 |
| Vojaĝo al mia unua kongreso | 142 |
| Jarfino | 144 |


## REDAKTORAJ VORTOJ

Jam pasis denove unu jaro kaj kutime je la fino de la jaro ni retrorigardas la pasintajn monatojn kaj iom pripensas, kio okazis dum tiu forfluganta tempo? Plej multaj el vi certe jam ricevis la informon ke en la vivo de Dia Regno, tio okazis, ke nuntempe oni povas trovi arkivajn numerojn surrete ĉe Kristanaj fontoj (http://fontoj.net/ sub trezorejo). Troviĝas tie la jarkolektoj 2006-2009. Eblas elŝuti ilin kaj sendi al interesuloj. Daŭre ni sendos tien la pasintjaran numeron.

Krome mi volas antaŭaverti vin ke sekvontjare ni festos la 100-jariĝon de KELI kaj mi esperas ke vi kontribuos via-ameniere (rakonto, fotoj, poemo) al Dia Regno per memoroj el via KELI-vivo. Povas esti kongresvojaĝo, aŭ korespondado, aŭ vizito aŭ prelego. Mi provos publikigi ĉion. Ĝis sekvontnumere: havu belajn festotagojn.



# La malfacila vorto "amo"

Leif NORDENSTORM, SE

La epistolo al la Galatoj nomas la naŭ fruktojn de la Spirito (Gal 5,22-23): *"Sed la frukto de la Spirito estas amo, ĝojo, paco, pacienco, komplezo, bonkoreco, fideleco, mildeco, sinregado; kontraŭ tiaj ne ekzistas leĝo."*

Neniu al la naŭ fruktoj de la Spirito estas facile difinebla. Tio ne malplej validas por "amo". La vorto "amo" estas uzata por tiel malsamaj fenomenoj kiel proksimaj rilatoj kaj fideleco inter samfamilianoj, dumviva amo en mizero kaj ĝojo inter edzo kaj edzino, en kiu sekseco estas parto, la spirita amo al Dio kaj multo alia. Iam eĉ estas malfacile uzi la vorton "amo", ĉar ĝi estas tiel malsame uzata. Ni tamen devas uzi ĝin, ĉar Jesuo mem ĝin uzas.

Sed apartenas al la naturo de amo, ke la vorto devas esti uzata en multaj malsamaj manieroj. Oni ne povas havi same proksimajn rilatojn al ĉiuj homoj. Amo temas pri tio ke oni en aparta maniero elektas iun individuon el aro. Oni ne povas ami ĉiujn en la sama maniero. Se oni klopodus, ne estus multe da amo por ĉiu unuopa homo. Devas ekzisti malsamaj specoj da amo. La biblia idealo por geedzeco estas tute klara: "Ne adultu!" Kiam temas pri amikeco oni ne povas havi tro da amikoj. Oni povas esti intima amiko al unu aŭ al malmultaj.

"En ĉiu tempo amiko amas, Kaj li fariĝas frato en mizero." (Sen 17,17)

Malgraŭ tio Jesuo volas disvastigi la amon al pli multaj homoj ol edzo, edzino, familio kaj la plej proksimaj amikoj. Li diras:

*"Novan ordonon mi donas al vi, ke vi amu unu alian; kiel mi amis vin, tiel vi ankaŭ amu unu alian. Per tio ĉiuj homoj scios, ke vi estas miaj disĉiploj, se vi havos amon unu al alia."* (Joh 13,35)

Jesuo rememorigas nin pri tio ke unue Dio amis nin. Same kiel bona patro aŭ patrino amas siajn infanojn en mizero kaj feliĉo Dio amas nin kaj alte aprezas niajn vivojn. La sekureco kion tio donas, povas inspiri al ni ami niajn kunulojn. Tie ĉi la vorto amo signifas nek korpan kaj erotikan amon nek amikecon. Ĝi tute simple signifas bonan konduton: esti pozitiva kaj konstrua, maldetrua, interpreti ĉion laŭ la plej bona ebleco, bone paroli pri aliaj. Eĉ ne tie ĉi Jesuo parolas pri tio ke ni devus ami ĉiujn. Li ne parolas pri universalaj tutmondaj etikaj principoj, sed pri la reciproka amo inter liaj disĉiploj, inter la kristanoj.

Jesuo do donas al ni praktike fareblan taskon; bona konduto kaj zorgo pri la homoj, kiuj estas en nia proksimeco.

☙

El la svedlingva blogo
sjalaspis.blogspot.com



# Bele maljuniĝi

Éva Farkas-Tatár, HU

Ĉiamverda estas la temo: bele maljuniĝi. Mi aŭdis pri ĉarma ideo okaze de la 60-jara naskiĝtago de konata verkisto, ke en la amika societo li ricevis belan karton sur kiu estis la teksto: *Estas facile al vi, vi jam havas malantaŭ vi kio estas malfacila*. Sed sur la dorsa flanko staris: *Atentu, nun sekvos, kio estos malfacila!* Mi, kiu jam bone konas la temon mi jesas, ĉi tiun spritaĵon. Mi kolektis kelkajn elstarajn saĝaĵojn pri la maljuneco – por pruvi kiel bone ni povas spritadi pri la lasta akto.

- Nenio pli rapide maljunigas ol la timo, ke ni maljuniĝas rapide.
- Se vi envias gejunulojn pro tio vi ne estos pli juna, sed vi plimultigas la afliktojn de la maljuniĝo.
- Ĉiu deziras vivi longe, sed neniu deziras maljuniĝi.
- Pli malmultaj estas tiuj, ĉe kiuj la animo supervivas la korpon, ĉe la plimulto la korpo supervivas la animon.
- Ni ankoraŭ ne estas maljunaj, se ni povas ĝoji pri niaj rememoroj, sed ni jam estas maljunaj, se la rememoroj doloras.
- En nia infanaĝo ni amas nian familion, kiel plenkreskuloj nian patrujon, kaj en nia maljuna aĝo jam la tutan homaron.
- La maljuneco malrapide venas, sed rapidigas ĝian alvenon malsano kaj malfeliĉo.
- La maljuneco en si mem ne retenas nin de ĉiu stultaĵo.
- La juneca maljunulo estas utila, sed la frumaljuna junulo estas malutila.
- Pli malfacile estas por tiuj, kiuj supervivas la forpasintojn.

Jen estas kelkaj hungaraj popolaj proverboj:

- Ĉiuj kulpoj ekdormas en la maljunulo nur la avareco vekiĝas.
- Pli valoras maljuna aglo ol juna strigo.
- Estas bone ripozi sub la ombro de maljuna arbo.
- Maljunan lupon eĉ malgranda ŝafido priridas.

Sufiĉas tiom da citaĵoj, utilas al ni, se ni iom ekstaras ĉe tiu citaĵo, kiu pli proksime tuŝas nin.

Tion mi jam apenaŭ kuraĝas proponi, ke tiun tekston rigardu gejunuloj de aŭ ĉirkaŭ nia familio kaj ili elektu kiu citaĵo pleje rilatas al ni – gemaljunuloj.

Post ĉi tio ni malfermu nian Biblion. Eblas lerni el la homaj saĝaĵoj eĉ ridi pri ili, sed evangelion fine nur la Biblio diras al la gemaljunuloj. Unue ni citu en memoron la grandan renkontiĝon:

> *“kiam vi estis juna vi zonis vin, kaj iris, kien vi volis; sed kiam vi maljuniĝos, vi etendos viajn manojn, kaj*

*alia vin zonos*, *kaj portos vin, kien vi ne volos.”*. (Joh. 21,18).

Tio unuavice estis dirita al unu persono, sed estas valida ankaŭ ĝenerale: la maljuneco kunportas la striktigon de la vivo. Se tion ni akceptas silente kaj obeeme, tiam povas eksoni la konsola evangelio. Mi citas du “grandajn” Vortojn. En ambaŭ majesta evangelio kuraĝigas la maljunulojn:

”*Ili verdestas en la kortoj de nia Dio. Ili floras ankoraŭ en la maljuneco, estas sukplenaj kaj freŝaj”* (Psa 92,l4).

Pli striktaj ja estas la kadroj, sed el la esenco nenion ni devas ĉesigi tial, ĉar ni maljuniĝis. Ankaŭ Dio nenion ĉesigas.

*”Ankaŭ ĝis via maljuneco Mi estos la sama, kaj ĝis via griziĝo Mi vin portos.”*. (Jes 46,4)

# Pri rusaj naciaj simboloj

De informa letero de la asocio de la Rusa Patruja Centro, 1997

Tradukis Larisa KUZMENKO, N.Tagil, RU

**Dukapa aglo kun sceptro kaj imperio en ungegoj**

Ĝi estas la plej antikva simbolo de la rusa popolo. Ĝis la revolucio de la 1917-a jaro ĝi estis la deviga parto de ĉiuj regimentaj standardoj, ŝtataj sigeloj, heraldikaj emblemoj, ligitaj kun la rusa historio kaj la rusa popolo, figura esprimo de la potenca imperio, kiu estis Rusio ĝis la 25-a de oktobro 1917.

Historia informo: En Rusio la dukapa aglo aperis sur la sigeloj kaj sur la rusa standardo komence de la 15-a jarcento, post la edziĝo de la unua tutruslanda aŭtokratulo Ivano la Tria kun la Bizancia reĝino Sofia Paleolog. Do, la dukapa aglo estis iam la blazono de la ortodoksia Bizancio, post ĝia malvenko (falo) rezulte de la batalo kun turkoj-osmanoj kaj poste ĝi transiras al Rusio kaj simbolas unuflanke stabilecon kaj eternecon de Ortodoksio, aliflanke ĝian heredanton kaj konservanton – Rusion. Iom pli malfrue, komence de la mezo de la 16a jarcento la kapojn de la aglo kronis tri kronoj, kio simbolas la komencantan unuiĝon de la Rusa popolo – Grandan, Malgrandan kaj Blankan Rusiojn.



La nuntempa ruslanda kompreno: Dukapa aglo estas la simbolo de eterneco de Rusio, la simbolo de sinsekveco de Bizancio kaj la pura konservo de la Ortodoksia kredo en la rusaj homoj. Tiu aglo simbolas ankaŭ la profundan

respekton de la historiaj radikoj kaj la nacia historio.

Du kapoj de la aglo simbolas historian necesecon por Rusio defendi sin kontraŭ Okcidento kaj Oriento. La brusto de la aglo, defendita per la ŝildo kun la bildo de Sankta Georgo, la Venkinto, kio estas la antikva blazono de Moskvo, montras al la sinsekveco de Rusio de la Moskva teritorio, kiel kolektanto de rusaj teroj. La sceptro kaj imperio en ungegoj de la aglo estas la figura esprimo de neŝancebleco de niaj naciaj fundamentoj, niaj ŝtataj limoj.

**Ruslanda nacia nigra-ora-blanka flago**

La historiisto A.Jazikov en 1858 skribis en sia artikolo pri la rusa ŝtata koloro:

> *”Ni ne estu fremdaj pri la penso, akceptita de ĉiuj popoloj kaj deziru ke nia Patrujo, kiu konservis tre multe da specialaj trajtoj, konservus ankaŭ la signojn, esprimantaj nian rusan distingan nacion, niajn naciajn kolorojn: nigran, oran(flavan), blankan.*”

Historia informo. Tri koloroj de la rusa nacia flago aperis rezulte de la historia evoluo de la ŝtata simbolismo de Rusio. La koloroj, kiuj kompilis la strian paletron de nia flago havas profundan antikvecon: ankoraŭ komence de la tempo de Ivano la tria la rusa ŝtata standardo aspektis tiele: la ora(flava) strio kun nigra aglo meze kaj blanka strio kun la bildo de la sanktulo Georgij la Venkinto sur la brusto de la aglo – tio estis la heredo de la rusa trikoloro, kiu estis konata por la tuta mondo.

Ĝis la revolucio1917 la koloroj de la strioj de la flago estis klarigitaj tiele: la nigra strio estas la koloro de la standardo de la Granda Princo, la Sanktulo Dmitrij Donskoj – la koloro de la dukapa aglo estas la simbolo de Rusio; la ora(flava) strio sur la flago estas la simbolo de Ortodoksio (Pravoslava kredo), kiu eklumis en Rusio en la jaro 988; la blanka strio sur la flago estas la koloro de la unua rusa blazono, la blazono de Moskvo, la simbolo de la rusa popolo, ĝia ofero por la Kredo kaj Patrujo.

La flago kun la nigra-ora- kaj- blanka strioj estis unuafoje hisita en Moskvo en 1815 dum la tagoj de la festo de la venko super la Napoleona Francio. Dum la regado de la imperiestro Nikolao la Unua nigr-or-blanka flago fariĝis tutnacia simbolo. En 1865 per la ukazo de la ŝtatestro Aleksandro la Dua la flagaj koloroj estis finfine legitimitaj kiel naciaj koloroj de Rusio.

La koloroj de la nuntempa rusa flago estas blanka, blua kaj ruĝa. Ili estis unuafoje enkondukitaj en la mara, komerca flago de Rusio per la reformoj de la reĝo Petro la Unua. La koloroj ne havas historiajn radikojn en la rusa simbolismo. La komerca flago ne reflektas la ideon de la Pravoslava kredo. La koloroj de la malnova flago memorigas pri la historiaj radikoj de Rusio: nigra – pri la granda venko sur la Kulikova kampo kontraŭ tatara jugo, ora – pri la gloro kaj nacia signifo de la Pravoslava Kredo por la rusaj homoj, blanka – pri Moskvo, protektanto de la rusa tero.

Nun la Rusia Patruja Centro de nia lando alvokas la homojn de Rusio por la nacia renaskiĝo de Ruslanda popolo.



# Teilhard de Chardin


Siegfried Krüger, DE

Kun Galileo la tero perdis sian apartan situacion en la kosmo.
Kun Darwin la homo perdas sian apartan situacion por la scienco--
Kun Chardin la homo ne perdas sian apartan rilaton antaŭ Dio en Jesuo Kristo.

**Teilhard de Chardin** naskiĝis 1881 en kastelo Sarcenat ĉe Clermont-Ferrand kaj mortis 1955 en Novjorko. Li estis teologo (jezuito), geologo kaj paleontologo. Ek de 1923 li faris esploradojn en Ĉinio kaj Mongolio. Ĉefaj publikaĵoj de li estas: *La homo en la kosmo* (1939); *La estonteco de la homoj; La dia regiono*

Li serĉis la tutan vivon la originon kaj specon de la evolua forto en la materio.

Teilhard de Chardin vidas la tutan universon kun komenco, kiel ni hodiaŭ imagas la praeksplodon. Ĉi tiun komencon li nomas Alfa. La tuta universo moviĝas sur akso, kiun li indentigas kun Jesuo Kristo, la finpunkto, la punkto




Omega. La nomoj Alfa kaj Omega venas el la apokalipso, en kiu Jesuo estas nomita la A kaj O (1,8; 21,6; 22,13).

Li vidas post la praeksplodo genezon trans la stadioj de senviva materio, de la pensado ĝis al pli alta vivoŝtupo, ties kulmino estas en Omega. La baza fenomeno de la evoluo estas la konscio, kiu jam devas esti ekzistanta en ŝpuroj je la komenco. Do portas jam la senviva materio la ĝermon de la konscio kaj kompleksiĝas trans plantoj kaj bestoj. Iam tiu kompleksiĝo atingis tian altan staton, ke vivaĵo unuan fojon konsciiĝas pri si mem. Tio okazis en la formo de la homo. La homo estas la unua vivaĵo, kiu konscias pri si mem. La homo estas memkonsciĝinta evolucio. Per tio la homo ne estas la simpla posteulo de bestoj, sed tute alia. La kompleksec o de la konscio kaŭzis novan vivaĵon. La homo ne nur estas pli alta besto. Chardin pensas, ke la evoluo ek de la stadio de la homo nur ankoraŭ progresas spirite, ĉar la korpa evoluo verŝajne atingis finon. Ĉi tie komenciĝas, kion en la gnozo oni nomas Noogenezo, do evoluo de la konscio.

## Evolucio kaj Kredo

Oni povus diri ke: Ĉarles Darwin pro la esploro de la evolucio perdis sian kredon. Teilhard de Chardin per la ekkono de la evolucio pli profunde trovis la kredon.

La kredo, kiun perdis Darwin, estis je la malnova Dio de la malnova kread-historio. La kredo kaj la religia entuziasmo, kiun trovis Teilhard, ĵus venis el la fascino pri la giganta evolucia proceso kaj la nova kreadhistorio.

## Teilhard kaj la nova bildo de la kreado

1. Dio ne faras la aĵojn rekte, sed tiel, ke ili fariĝas.
2. La necesan forton Dio metis en la spirit-materion/naturleĝojn.
3. La spirito estas envolvita en la materion kaj disvolviĝas per la evolucio.

## Teilhard pri la akcepteco de la evolucio

Kondiĉo por la akcepto de la nova historio pri la kreado de la mondo estas: ke la kredo ŝanĝos profunde la bildon pri Dio. Dio ne estas la aktuala faranto, sed la kaŝita potenco en la universo, la bazo de la estado.

Samtempe estas Li, kiu ekigis la evolucion – ekirigis la materion – kaj en longaj tempospacoj progresas – en malferma proceso ankaŭ kun sakstratoj kaj misevoluoj – tamen celdirekte trovas sian vojon.

Ĉe ĉiu sekreto de ĉi tiu Dio tamen eblas havi personan rilaton, rilaton de miro, dankemo, rilaton de servanta sindonemo kaj de fina fido.

## Konsekvencoj por la kreadkredo

La evolueca kreadkredo devas sin adiaŭi ne nur de direktaj kaj daŭraj intervenoj de la Kreinto, sed ankaŭ de tio, ke Dio antaŭdestinas, kiam kaj kie la homo X aŭ Y kreiĝas kaj kion li je kiu tempo faras.

Sed kun la evolucio akordebla estas modifita kreadkredo, kiu akceptas, ke potencialoj por vivo, religio kaj ankaŭ por saviĝo kaj kompletigo de ĉi tiu kreitaĵo jam de Dio antaŭ ĉiu tempo en la naturleĝojn estis metitaj kaj per la evolucio povas disvolviĝi libere en spaco kaj tempo.

Ke la kreadkredo ne rilatas nur al ekpuŝanta Dio, sed fidas al helpanta Dio, tio estas la speciala potencialo de la relegikapableco. Tio estas sekvo de spiriteca ligo inter kreaĵo kaj Kreinto.

Chardin konstatas spirit-kulturan evolucion (Noogenezo) kun saviĝ-kapablo, kiun celas al la homo Jesuo Kristo kaj kosman evoluŝtupon kun fina punkto Omega.

## Konsekvencoj por la eklezio

Por Teilhard la esploroj de Darwin tute nove skribis la historion de la kreado de mondo kaj naturo. Tio signifas, ke la kristana kredo radikale baziĝu sur ĉi tiu nova kreadhistorio. La ĉi tie gajnitaj naturscienc aj komprenoj estas la fundamento de la tuta, moderna mondo – ĝis medicino, farmacio, genesploro ktp. Se la eklezio ne akceptas tion, tiam ŝi perdos baldaŭ la rilaton al la realeco, tiam ĝi sekiĝos kiel floroj sen akvo.

# Skizoj pri filozofoj-kuracistoj, IV

De la alkemio al la jatrokemio –
Arnoldo de Villanova kaj Paracelso

Endre DUDICH, HU

*Ne ekzistas du veroj, nome ke io estus vera en la scienco kaj falsa en la religio, kaj inverse.*

Sankta Tomaso de Akvino

## 1. Historia fono: la Kruco kontraŭ la Lunarko

Iu Konstantino naskiĝinta en Afriko eklernis la metion de kuracado en Bagdado, kaj mortis kiel benediktana monaĥo en la italia abatejo Monte Kasino en la jaro 1087. Estis li, kiu transplantis la konon de kuraciloj kaj terapioj de la Islama mondo al okcidenta Eŭropo. Iĝis fonditaj publikaj hospitaloj (malsanulejoj).

Fine de la 11-a jarcento kaj en la 12-a fondiĝis pluraj kavaliraj ordenoj: Johanitoj (1070), Templanoj (1180), Teŭtonaj kavaliroj (1190). Estis organizitaj krucmilitoj por liberigi Jerusalemon kaj la tutan Sanktan Landon. Ladislao I-a la Sankta, reĝo de Hungario, estis elektita ĉefkomandanto de la unua krucmilito. Sed li neatendite mortis antaŭ la ekiro de la kampanjo. Poste reĝo Andreo la 2-a fakte gvidis (ne-sukcesan) krucmiliton, en 1217.

En la 13-a jarcento fondiĝis du t.n. almozulaj ordenoj, tiu de la Dominikanoj (en 1215) kaj tiu de la Franciskanoj (en 1223).

La fondiĝon de la unua universitato en Bolonjo, Italio sekvis pluraj aliaj: Parizo 1200, Oksfordo 1201, Kembriĝo 1231 k.a.

En la pariza universitato estis pro-

# Belan kristnaskan feston & Sukcesan novan Jaron

al ĉiu leganto de Dia Regno
deziras la sekretario & distribuanto
kaj la redaktoro

*Pavel Polnický & Bengt Olof Åradsson*



fesoroj, inter aliaj, la du plej elstaraj personaĵoj de la t.n. alta skolastiko (ambaŭ dominikanoj):

- La germano Albert von Bollstadt, t.e. Albertus Magnus (Alberto la Granda), la *Doctor Universalis*, la patrona sanktulo de natursciencoj, kaj lia disĉiplo en la universitato de Kolonjo (Köln)
- La itala Sankta Tomaso de Akvino, la *Doctor Angelicus*, la plej granda filozofo-teologo de la katolika eklezio. Lia doktrino nomiĝas tomismo.

Ili sukcesis filozofie defendi la kristanan religion kontraŭ la doktrinoj de la Islamo, speciale kontraŭ la aristotelisma filozofio de Averroes kaj aliaj arabe verkintaj saĝuloj, kies verkoj estis tradukitaj en la latinan lingvon.

Estu menciitaj ankaŭ la gravaj konfliktoj okazintaj inter la patriarĥo de Konstantinopolo kaj la papo de Romo (la *Granda Orienta Skismo*, 1054, dividinta la kristanan eklezion je katolika kaj ortodoksa), kaj la longdaŭra luktado por hegemonio de la germana-romia imperiestro kaj la roma papo (lukto pri investituro).

## 2. Arnoldo de Villanova el Valencio (1250 – 1311)

Katalano, li estis profesoro de kuracado en la universitato de Montpellier en Suda Francio. Li akiris grandan famon, kuracis reĝojn kaj papojn, li eĉ estis kortega kuracisto de la papo. Lia skolo produktis ĉ. 50 alkemiajn verkojn. Laŭ li la *quinta essentia* (krom la kvar "klasikaj": tero, akvo, aero kaj fajro) estas nenio alia ol la Mondspirito mem, kaj la *aqua vitae* (akvo de vivo) – la spirito de la ŝtono de la filozofoj. Onidire li sukcesis produkti oron. La proceduron li priskribis, sed intence nebule, en la Libro de sigiloj. Kaj li admonis la leganton*: "kiu malkovras la sekreton, estu malbenita, kaj trafos lin apopleksio."*

Onidire Villanova provis eĉ produkti artefaritan hometon (*homunculus*), sed estas malklare, pri kio fakte temis. Li verkis libron ankaŭ pri la vinoj (*De Vinis*).

Villanova multe vojaĝis, ankaŭ pri diplomatiaj misioj, kaj fine droniĝis en la maro sekve de ŝiprompiĝo.

En la 13-a jarcento la eŭropajn reĝojn ege interesis la alkemio. Kelkiuj eĉ farigis monerojn onidire fanditajn el oro produktita de la kortegaj alkemiistoj per transmutacio. Sed baldaŭ estis malkovritaj la trompoj. Ties konsekvenco estis, ke la alkemiistoj perdis la apogon de la regantoj, kaj ilian protekton kontraŭ la Sankta Inkvizicio, la kontraŭhereza agentejo de la Roma papo.

En la jaro 1317 (do ses jarojn post la morto de Villanova) papo Johano la XXII-a eldonis buleon (dekreton), kondamnante tiujn, kiuj

> *"kiam ne trovas la veron, elpensas ĝin. Ili atribuas al si tiajn kapablojn, kiujn ili fakte ne posedas; ili kaŝas sian trompon per vortoj, kaj finfine per ruzaj fi-agoj, prezentante kiel oron kaj arĝenton ion, kio estas nek la unu, nek la alia."*

En la monaĥaj ordenoj de Franciskanoj kaj Dominikanoj ekvalidis dekretoj

malpermesantaj al la monaĥoj okupiĝi pri alkemio.

La alkemiistoj retiriĝis en la ŝirmantan fortikaĵon de la t.n. jatrokemio (medicina kemio). Por defendi sin kontraŭ la atakoj de la aristotelista skolastiko disvolvita precipe de Sankta Tomaso de Akvino, ili turnis sin al la idealisma neoplatonismo kaj al la numerologia neopitagoreismo de la Renesanco.

La eliksiron de la eterna vivo la jatrokemiistoj identigis kun la *panacea universalis*, la ĉion-kuracanta kuracilo.

La pinta personaĵo de la jatrokemio estis Paracelso.

3. Philippus Aureolus Bombastus von Hohenheim Paracelsus (1493 – 1541)

Svislandano, lia idearo estis konscia revivigo kaj plidisvolvo de la magia mondkoncepto, kontraste al kaj kontraŭ la raci(onal)ismo de la skolastiko.

Laŭ Paracelso la triopo sulfuro – hidrargo – salo estas analoga al la triopo korpo – animo – spirito.

Ĝis tiam la alkemio estis iaspeca tera astrologio. Paracelso plikonstruis ĝin je universala kosmologio. Tiu-cele li inventis novajn "estaĵojn". Tiuj estis Arĥeo, kiu transdonas la astrajn fortojn al la tera mondo; la pramaterio nomita Iliastro, kaj la demiurgo Vulkano.

Tre sukcesa en la kuracado, kontraŭulo de la "oficiala" kasto de kuracistoj, pioniro de la naturkuracado, li estis tre orgojla kaj maltolerema. Li konsideris sin mem la unusola posedanto de la Vero, kaj alies skribaĵojn brulendaj.

Ekzistas pli detala (kaj multe pli favora) priskribo de la vivo kaj agado de Paracelso, verkita de Jana Cichová.

[Sed tiun mi nun ne publikigas / red]

# 61-a KELI kongreso – 1:a listo de aliĝintoj

1. Bági Irén, HU
2. Cousson Philippe, FR
3. Farkas Antal, RO
4. Gaillard Samuel, FR
5. Stamm Sieglinde, AT
6. Ganswijk van Wil, NL
7. Farkas Eva, HU
8. Laslo Maria, RO
9. Popoviciu Eugenia Ekaterina, RO
10. Olah Margit Judit, RO
11. Stier Gabriella, RO
12. Fischer Oldřich Arnošt, CZ
13. Scurt Gavriel, RO
14. Scurt Terézia Ildiko, RO
15. Birta Sobolcio, RO
16. Åradsson Bengt Olof, SE
17. Åradsson André, SE
18. Ráczkevy-Eötvös Ágnes, HU
19. Puijenbroek van Ruth, CH
20. Tuinder Vera. NL
21. Tuinder Jacques, NL
22. Stroinski Hieronymus, DE
23. Stroinski Monika, DE
24. Cokanov Genčo, BG



# La frua kristanismo – speciale en Nord-Afriko

Gerrit BERVELING, NL

Judismo estis tre bunta tutaĵo. Kvankam kristanaj teologoj tra la jarcentoj preskaŭ ekskluzive okupiĝis pri la palestina judismo el la epoko de Jesuo, jam tie ili sukcesis distingi plurajn grupiĝojn, tendencojn, skolojn – aŭ kiel oni nomu ĝin –, kiuj montras inter si tre gravajn diferencojn. Kaj tiam temas ankoraŭ pri eta procentaĵo de la tuta judismo! (Ekster Palestino la diverĝoj eĉ estis pli drastaj, kelkfoje eble pro geografia disiĝo, kelkfoje intence por diferencigi sin disde la palestina ordonema rabenismo: jam en la 5a jarcento a.K., por doni ekzemplon pri ne tre ortodoksa (laŭ palestina rabena vidpunkto) judismo, ekzistis granda juda kolonio en Elefantino en Egiptio, havanta propran templon, kie ili adoris apud JHVH ankaŭ iun diinon Anath kaj eĉ trian diaĵon! Kiam en 411 egiptaj soldatoj ruinigis ĉi templon, la tieaj Judoj skribis al la jerusalema ĉefpastro por helpo ĉe la rekonstruo; sed tiu ĉi eĉ ne degnis respondi.)

La plej konataj grupiĝoj en Palestino mem estas la fariseoj, kiuj, provante sin teni rite puraj, provis kiel eble plej precize plenumi ĉiujn ordonojn de la Torao; la saduceoj, kiuj iome kunlaboris kun la romia okupanta forto, por tiel kiel eble bone ŝirmi la pluekziston de la templo kun ties oferoj; la zelotoj, kiujn oni povus nomi rezistbatalantoj, ĉar ili rifuzis agnoski la romian potencon, rekonante nur Dion super si kaj ofte plej perforteme batalante la miskredantojn; la esenoj, kiuj kvazaŭ monaĥeje retiriĝis el la normala ĉiutaga vivo de la popolo: ili ne plu konsideris kiel Di–benatan la jerusaleman pastraron nek la tiean templon (la ĉefpastron ili eĉ rekte malbenis!), ili ne plu volis kontaktiĝi kun la popolo kiel tutaĵo, ĉar en la dezerto ili volis prepariĝi por la alveno de la de ili atendata Instruanto de Justeco, ia mesieca figuro, pri kiu ili multe himnis. Krom ĉiuj ĉi kompreneble ankoraŭ ekzistis la Samarianoj, kiujn la aliaj rifuzis agnoski kiel JHVH–kultantojn. Kaj por fini, ni ne forgesu la sennomajn simplajn paŝtistojn, fiŝistojn, terlaboristojn, kiuj, provante vivi kiel eble plej ĝuste, sendube tute ne havis eblon, teni sin rite puraj (pro ilia metio) aŭ enprofundiĝi en pristudo de la Torao (pro manko je tempo): la simplaj ”homoj de la lando”.



Ruinoj de Kartago

El Galileo en la nordo, venis nova profeto: Jesuo el Nazaret. Eble origine kunlabore kun, sed baldaŭ sendepende de Johano Baptisto, li predikis la alvenon de la Dia Regno. Li predikis, ke urĝas, konvertiĝi. Multrilate lia prediko similas antaŭajn profetojn de Israelo. Sed malsama estis la impreso, kiun li faris.

Preskaŭ certe, li ne mem sin titolis Mesio, neniun "altan" titolon li arogis, li nur nomis sin "filo de homo", t.e. homido – semidismo por "homo" senplie. Laŭ la rakontoj, kiuj baldaŭ estiĝis ĉirkaŭ lia agado, li sanigis multajn. Kelkaj asertis, ke ĉe tio lin helpis demonoj, aliaj tie rekonis la manon de Dio. Li parolis pri konvertiĝo, pri la amo de Dio por ĉiuj – sendistinge. Ofte parabolojn li uzis, elektante siajn ekzemplojn laŭ la simplula vivo, apartaĵojn de ŝafistoj, de terlaboristoj, de fiŝistoj, ja eĉ de virinoj, – ĉar se ie, do certe rilate virinojn, liaj agoj estis revolucie novaj. Por la rabena judismo, la virino ja ne multe valoris; piuloj eĉ kutimis rite preĝi, ke ili dankas Dion, ke tiu ne faris ilin virinoj... Ja laŭdire eĉ Tora–rulaĵo fariĝus rite malpura, se ĝin nur tuŝis mano virina.

> Kaj vere okazis lia pasiono. Per krucumo.

Kaj Jesuo, kiel prave reemfazas feminisma teologio, ekkontaktis virinojn anstataŭ eviti ilin (oni ja povus malpuriĝi per tia kontakto, se hazarde la virino menstruus), alparolis ilin, ke ili konvertiĝu por eniri la Regnon de Dio – do traktante ilin kiel egalajn je viroj! – kaj tio tiuepoke estis revolucia. Kaj, kiam li kolektis areton ĉirkaŭ si de fideluloj, inter tiuj baldaŭ distingiĝis ankaŭ pluraj virinoj. Kiel ni povas legi, eĉ edzino de ministro de la reĝo estis inter ili: neimagebla provokaĵo, permesi tiel altrangulinon forlasi la familian vivon! (Luko 8:3)

Post travojaĝo tra Galileo, li ekiris vojon al Jerusalemo, probable bone konsciante, ke tiel li riskos la vivon. Kaj kvankam poste oni verŝajne "kolorigis" la raportojn priajn (per antaŭdiroj pri morto kaj resurekto? aŭ ĉu tion li atendis? Neeblas decidi tion ĉi kun plena certeco), li certe plurfoje avertis siajn disĉiplojn, esti singardaj, ne nomi lin Mesio.

Kaj vere okazis lia pasiono. Per krucumo.

Kaj je tio ĉi, ŝajne, lia historio nur komenciĝas. Ĉar alvenis virinoj dirantaj, ke li ne plu troviĝas en la tombo, kien ili estis irintaj por balzami sian amatan Jesuon. – La komenca reago je tio estis simpla ne-kredo: neeblas ja: kiu mortis, mortis. Pliposte plinombriĝis tiaj atestoj: Petro lin vidis, poste aliaj, fine eĉ fratoj de Jesuo, kiuj dum lia vivo neniam estis prenintaj serioze lian mision: pri Jakobo oni rakontis, ke li konvertiĝis pro la apero de sia frato Reviva. Ekpredikis pri Jesuo liaj antaŭaj gedisĉiploj, ekpredikis ankaŭ – pli mirige – kelkaj, kiuj komence kontraŭis ĉi novan sekton. Ekzemple Paŭlo

(hebree Saul), kiu post fulmtrafa konvertiĝo al la mortigita Mesio, subite ekpredikis pri lia signifo, pri la nova eblo, kiun disponigis Dio al la tutmonda homaro: per Jesuo Kristo ne plu gravas plenumi la Toraon, kiu ja ne povas justigi homon antaŭ Dio, sed nura kredo kapablas savi ĉiujn.

Kaj ĉe tiu predikado pri la Mesio veninta kaj mortigita, oni laŭkapable provis klarigi, kiu estis estinta Jesuo el Nazaret, kion li estis intencinta. Kaj tiaj interpretoj – ĉar interpretoj ja estas tiuj unuaj "kristologioj" – sufiĉe bunte variis.

Jam jarcentojn la Judoj estis atendintaj iun Mesion, kiu venos nome de Dio. Sed kio estu Mesio? Jen disiĝis la interpretoj: kelkaj atendis iun novan reĝon laŭlitere el la dinastio davidida, ĉu por regi Palestinon kaj la tieajn Judojn, ĉu por rekonduki ĉiujn popolanojn tien el ĉiuj partoj de la mondo, do returne el la diasporo; kelkaj eĉ kredis, ke tia Di–helpata reĝo davida certe kapablos submeti ĉiujn gentojn de l' homaro; aliaj nur vidis la Mesion kiel iun antaŭpreparanton por Dio mem: Tiu ja mem reĝos.

Depost la tempo de la babela ekzilo, oni foje diris, ke estonte Dio sidigos sur unu tronon kaj reĝon kaj ĉefpastron, kiuj kune – sen ajna malpaciĝo – pace paŝtos la popolon (Zeĥarja 6:13). Alia afero relative influhava tiuepoke, estis apokaliptiko. Depost la makedona tempo, sub la regado de helenismaj regnestroj, kiuj provis helenigi ĉiun popolon, pluraj Judoj rezistis sange – per la insurekcio makabea, sed ankaŭ literature – per apokalipsoj. Tio estas literatura ĝenro, ĉe kiu kutime oni ŝajnigas iun praulon kiel la verkinton, kiu jam antaŭ tiom da jaroj averte antaŭdiris "kaŝitajn" vortojn, kiuj nur nun riveliĝas, por ke oni rekonu ne nur ke la tutan historion jam – ĝis nun – antaŭanoncis Dio, sed ankaŭ ke oni eksciu, ke post iom da turmentiĝo nepre ja sekvos la decidiga batalo kontraŭ la Maljustaj aŭ kontraŭ la Bestio (ĉar tre abunde apokalipsoj uzas metafore bestojn por indiki reĝojn malamatajn): sed fine venkos nepre la Bonaj kaj ilia Dio JHVH. La plej konata apokalipso tiuepoka estas la libro Daniel, kiun – se eĉ kun iom da hezito – la rabenoj akceptis en la hebrean kanonon.

Frua kristanismo certagrade difineblas kiel malsamaj eĥoj je unusama Jesuo el Nazaret: multajn tiajn eĥojn oni poste kunigis (densigis) en la evangeliajn rakontojn, sed kelkajn oni tamen malakceptis. Kelkaj vidis Jesuon kiel portanton de la venonta saviĝo: oni atendis lian "paruzion" (lian Venon); karakteriza preĝoformulo estis Maran atha (Sinjoro, venu!) Aliaj – malpli jude – deiris de la helenisma koncepto de la Dia Homo (θεῖος ἀνήρ), la miraklofaristo, pri kiu eblas dubi, ĉu li estas ankoraŭ homo aŭ ĉu nur maskita diaĵo: ĉi koncepton oni tamen ne kanonizis en la N.T. Ree aliaj deiris de la juda Saĝo–literaturo (Verkoj de Salomono, pseŭdepigrafaĵoj, Jesuo Siraĥ, k.s.), kaj interpretis Jesuon pli malpli kiel enkarniĝon de la Saĝo de Dio, kiel la antaŭekzistintan Parolon de Dio, kiu sin humiligis sed estis altigita de Dio. La "Pasĥa–kristologio" emfazis, ke Jesuo per sia pasiono kaj resurekto montriĝis

esti la Mesio, la Kristo. Aliaj emfazis prefere, ke li estis Profeto eskatologia, por dispeli fierulojn, por altiri humilulojn. Kelkaj ankaŭ vidis en li la davididon, kiu fariĝos reĝo. Sed tiun koncepton oni – pro lia morto surkruca – ja devis reinterpreti, eskatologie. Kelkaj eĉ nomis lin la sola ĉefpastro!

Aŭ la Filo de Dio, aŭ Filo de Homo – laŭ Daniela senco.

## Per la predikado fare de tiuj unuaj gedisĉiploj disvastiĝis la nova sekto

Per la predikado fare de tiuj unuaj gedisĉiploj disvastiĝis la nova sekto. Kutime pere de judaj grupiĝoj, ĉar pro la preskaŭa ĉieesto de Judoj, pro la diasporo, iliajn sinagogojn oni trovis ĉie; tie oni do anoncis, ke jen la longe atendita Mesio estas veninta: Jesuo. Komence kristanismo estis pure nur sekto de la judismo: preskaŭ ĉiuj apostoloj estis Judoj, preskaŭ ĉiuj fruaj kristologioj (interpretoj pri Jesuo kiel la Kristo de Dio) same estis judaj. Sed multloke tra la Romia Imperio, pro ĉi nova religia koncepto, splitiĝis la sinagogoj: ĉar multaj ne povis akcepti Mesion krucumitan.

Oni sin turnis al la ne–juda medio, konvinkite, ke Dio savos ankaŭ tiujn. Tiel estiĝis apud la judaj kristanoj nun ankaŭ ne–judaj. Kaj problemon tio naskis: ĉu ne–juda kristano (same kiel la judaj kristanoj aŭtomate faris) observu la regulojn de la Torao? Aŭ ĉu nur parton?

Tiel formiĝis kristanaj ”eklezioj” (la helena ἐκκλησία etimologie signifas ”kunvokita kunveno”: jam delonge ĝi estis tradicia vorto por ĉiuj popolkunvenoj pli malpli oficialaj). Oni distingas inter ili la jud–kristanajn kaj la helenismajn, sed ĉi lasta termino povus kovri du malsamajn nociojn: pro la diasporo la plimulto de la Judoj ne plu estis lingve hebrea, sed fariĝis jam minimume kulture helenisma (eĉ se parte kun latina lingvo): kristanajn eklezioјn el tiaj Judoj oni povis nomi helenismaj (vidu en Agoj 6 kaj 7: Stefano); aliparte, kiam poste estiĝis ankaŭ eklezioj pure ne–judaj, ankaŭ tiujn oni povis indiki kiel helenismajn.

Paŭlo fondis plurajn (miks)helenismajn ekleziojn. En sia predikado li emfazis, ke ne la Torao savas la homon, savas nur Dio per Jesuo Kristo, fakte nur pro la fido je Li. Paŭlo krome emfazis, ke – post Kristo – ne plu gravas la distingoj inter Judo kaj Greko, inter viro kaj virino, inter sklavo kaj liberulo. En liaj eklezioj, kvankam origine judaj, estis sufiĉe multaj ne–judoj – plene egalrajtaj. Inter siaj kunlaborantoj li mencias same virojn kiel virinojn (Rom.16).

En pluraj rilatoj lia tipo de eklezio estis nova tipo. Oni trovis ĝin tra Malgrand–Azio (nuna Turkujo) kaj Grekio.

Sed en orienta direkto kristanismo same disvastiĝis, laŭ la legendoj i.a. pro la klopodoj de la apostolo Tomaso, kiu eĉ estus atinginta Hindujon. En Mezopotamio kaj Sirio, ĝi restis sub forta

influo de la origina judismo; same okazis en Nord–Afriko.

Tie en Egiptio, kiel sciate, loĝis amaso da Judoj. En Aleksandrio estiĝis la – juda – Septuaginto, samkiel la Targumo kaj la Peŝita en Palestino kaj Sirio. Kaj pli okcidente, en la romia provinco Afriko (nuna Tunizio) Kartago estis siavice grava juda centro. La tiea judismo lingve estis latina. Ili havis siajn proprajn bibli–tradukaĵojn: la ”Afra”.

En Nord–Afriko kristanismo relative rapide disvastiĝis. Neniu scias, kiu ĝin tien transportis. Neniun apostolon oni tie menciis, neniun praegan verkon oni tie verkis. Ĝi estas tie kvazaŭ ”el la nenio”. La origine judaj kristologioj tie estis influhavaj, la ennovaĵoj de Paŭlo, kiel oni ĝin titolis, tie estis relative nekonataj, ĉar kvankam jam la unua kristana teksto el ĉi romia provinco, la Martirakto el Skilio, mencias ”leteroj de Paŭlo, homo justa” (vs 12), tamen lia influo fakte nur ekgravas en Afriko depost Aŭgustino de Hipono. Ĝis tiam la afrikan kristanismon karakterizas forta preokupiĝo pri tiaj demandoj, kiel ekzemple: ĉu kristano rajtas partopreni spektaĵojn? ĉu li akceptu fariĝi komunuma oficisto, ĉu militisto? kiel sin vestu virinoj, ĉu kun vualo aŭ sen? ĉu oni rajtas reedziĝi? – demandoj, kiuj tute ne tuŝas tiel fundamentajn nociojn kiel la ”justiĝon de la homo antaŭ Dio” aŭ la ”implicaĵojn de la krucumo de l' Mesio”, – demandoj, kiuj pli malpli rivelas leĝecan (ĉar ja origine judisman) tendencon de la tiea kristanaro.

Origine kristanismo neniel estis unueca, ne nur rilate kristologiojn, kiel dirite, sed plurrilate. Kion plipostaj generacioj nomis herezaĵoj, origine ekzistis senplie apud aliaj konvinkoj.

Origine kristanismo neniel estis unueca, ne nur rilate kristologiojn, kiel dirite, sed plurrilate.

Tra preskaŭ ĉiuj provincoj (kaj ĝis lontane ekster la Romia Imperio) tra pluraj religioj etendiĝis tendenco, serĉi la Veran Scion, la Profundan Konon. Tion oni nomas Γνώσις, la Gnostiko. Karakterizas ĝin la plej rigora distingo inter Bono kaj Malbono, inter la lumo kaj la mallumo, inter la Spirito kaj la Korpo, ktp. Inter ĝiaj sistemfarintoj elstaras Valentino. Li rakontis, ke el la plej Supera Dio eliris pluraj emanaĵoj, eonoj, je ĉiam malpli alta nivelo, ĝis finfine tiuj atingis la nivelon de la materio. La homoj enhavas ioman fajreron el la etera realeco, sed grandaparte ili estas materiaj: do, por saviĝi el ĉi terura troviĝejo, la homoj ekkonu sian staton per la Vera Scio, kaj klopodu liberiĝi el ĉi materio, interalie ne plu naskante infanojn, ĉar tion farante oni ja obeas la Malbonon, kiu deziras, ke la homaro restu sklava al la materio. Kelkaj kristanoj heroldis, ke la Vera Kono estas Kristo: Lin trovinte oni povos liberiĝi. Pluraj eĉ predikis rekte miksaĵon gnostike–kristanan. Ekzemple Marciono, kiu instruis, ke ekzistas du Dioj: la Dio de la Olda Testamento kaj

la Dio de la Nova Testamento. La Dio de la O.T. estis la Kreinto, kiu devigis la diajn fajrerojn loĝi gaste en la materiaj formoj; la Dio de la N.T. – la Patro de Jesuo – estis Amo, volanta savi la homojn. Tiel li kombinis la novan religion kun la ĝenerala tendenco gnostika.

En Malgrand–Azio ekpredikis iu Montano kune kun du profetinoj, ke li estas la Parakleto, kiun anoncis Jesuo. Li fondis ekleziojn kun tre forta fido je la Sankta Spirito: ili ree ekparolis ”en langoj” (kiel ankaŭ estis okazinte en la tempo de Paŭlo, sed poste estingiĝis), ili estis treege entuziasma instiga, stimula movado, kiu provis eduki la kristanojn fariĝi pli perfektaj kristanoj, ĉar – laŭ ili – fakte la ”oficialaj” eklezioj estis tro sendistingaj, kaj tro liberalaj, maltro severaj ekzemple kontraŭ renegatoj, kiuj deziris reveni – post ĉesiĝo de persekuto surloka...

La Montanismo estis rigora: veraj kredantoj ne estu tro facilanimaj al si mem rilate sian saviĝon: oni multe postulu de si mem. Montanismo forte kaj vaste diskoniĝis kaj varbis multajn anojn. Plurloke ĝi formis rekte konkurencajn ekleziojn apud antaŭaj.

Kaj – ĉu ĝuste pro la tendenco je ĉiama okupiĝo pri demandoj pri kio licas? – speciale en Afriko Montanismo akiris multnombran anaron.

Kaj en tiu provinco, en la dua duono de la dua jarcento, loĝis kaj formiĝis Tertuliano. Li akre oponis la Gnostikon, Valentinon kaj Marcionon, li funde okupiĝis pri ĉiuj ”afrikaj” demandoj, li poste aniĝis al Montanismo kaj, kiam ĝi montriĝis ne sufiĉe rigora por li, fine li fondis Tertulianismon, pli radikalan.

Kaj la postan generacion en Afriko laboris Cipriano, kiu ankaŭ fariĝis tre influhava ĝis longe ekster sia provinco: kaj pri li oni citas, ke oftege, kiam li konfrontiĝis kun problemo, diris: “Donu la Majstron”, petante la verkojn de Tertuliano por tie trovi gvidilon.

En la dua jarcento okazis grandaj aferoj. El la menciita konfrontiĝo kun la Gnostiko, el ofte akraj disputoj kontraŭ la Judoj, el batalo kontraŭ sektecaj tendencoj, kiel Montanismo, sentebliĝis certa bezono je difinita priskribo pri tio, kio estu konsiderata kiel vera kristanismo. Tiel formiĝis la kanono de la N.T. kaj, finfine, en la grave influaj kredkonfesoj de la Ekumenaj Koncilioj. (Niceo, Ĥalcedono, Konstantinopolo)

Sed la plej decidiga faktoro por la homoj, aniĝi al ĉi nova religio, nepre ne estis tiuj ĉi pridogmaj kvereloj, sed la komunuma vivo de la kristanaro: ĉion ili konsideris komuna (Didaĥeo IV:8), regule ili kunvenis por siaj veraj festoj de gefrata amo ”sub rigardo de Dio” (Tert.Apologio XXXIX), ili sciis sin ”tertium genus”: nova homspeco – apud la jam delonge konataj Judoj kaj Helenismanoj (plurloke en Al Diogneto).

Kaj precipe, ni nepre ne forgesu mencii, kiel fortan impreson faris la heroeco de la Martiroj. Ja ne senkaŭze famiĝis la parolo de Tertuliano: “Semo estas la sango de kristanoj!” (Apologio L:13)

La teksto estas ĉerpita el:
Berveling, Gerrit (tradukanto) (1982) *Tertuliano: Apologio,* el la serio Voĉoj Kristanaj, Vlaardingen



# "Voj-kirkoj"

Raita PYHÄLÄ, FI

Emeritaj instruistaj geedzoj antaŭ pli ol dudek jaroj iniciatis konstruadon de ekumena kapelo apud sia bieno en centra Finnlando. La vilaĝanoj entuziasmiĝis kaj lokaj entreprenoj helpis finance. Ĉiuj laboris kune, sen salajro kaj peto de rekompenco. La kapelo estis finkonstruita en 2009 kaj nun ĝin jam vizitis pli ol 100.000 homoj, la plej foraj venintaj el Azio kaj Amerikoj. La kapelo estis konstruita el sveda ŝtalo, finnaj granito, pina, larika kaj picea lignoj, sur privata tereno. Ankaŭ EU finance helpis.

Kiam vizitantoj alvenas, ili tuj sentas la trankvilon kaj senpeziĝon kaŭzitajn de la beleco de la naturo.Unuj venas nur pro kaprico kaj scivolemo, aliaj por ripozigi sian animon, kvietiĝi kaj preĝi. La altaron anstataŭas fenestrego, tra kiu oni vidas verda-blankan betularon kaj bluan lagon. La koloroj ŝanĝiĝas laŭ sezone. La spirhaltiga natura vidaĵo igas la preĝejon taŭga al ĉies meditado kaj memorigas pri tio, ke niaj praavoj adoris la naturon. La akustiko de la kapeleto estas tre bona kaj okazas tie koncertoj, poemdeklamadoj, kunvenoj, geedziĝoj, baptoj. La benkoj sidigas kvardekon da aŭskultantaro. Per publikaj veturiloj oni ne povas atingi la sanktejon, ĝi foras dudekon da kilometroj de la centro de la urbeto Virrat. "Aŭskultu la silenton" sonas la invito de Matias-kapelo.

Informoj en la finna, sveda, germana kaj angla ĉe www.matias-kappeli.net







# E-vid-e-nt-e ankoraŭ ne ripozas

Jacques TUINDER, NL

Pri d-ro L.L. Zamenhof ni certe scias, ke li ne ripozis antaŭ sia lasta, definitiva ripozo, kiam la senkompata Morto kruele forprenis lin de ni... Ni same scias, ke tiu bonkora okulisto 'baptis' sian lingvon per interna ideo. Nu, mi apartenas al tiuj 'diligentaj kolegoj', kiuj klopodas iom eksterigi, videbligi, konkretigi tiun internan ideon. Jam ek de 1966 mi senlace mesaĝas tra la mondo, ke milionoj da blinduloj – tri el kvar – estas tute nenecese, absolute senbezone vidhandikapitaj. Kaj laŭ la spirito de d-ro Esperanto mi streĉas miajn fortojn (re)doni aŭ plibonigi vidpovon de homoj en ekonomie malfortaj landoj. La ŝlosilvorto estas okulmalferma solidareco kun la plejmalriĉuloj. Dum pli ol 44 jaroj Fondaĵo Evidente, kiel rekantaĵon, jam heroldas la saman tekston, kvankam ofte mi spertis tion kion kutime travivas profetoj kriantaj en la dezerto.

Danke al grandaj sponsoroj en Nederlando pasintjare jam okazis kvar misioj: en februaro al Srilanko (du optikistoj), en marto al Maŭritanio (unu okulisto kaj kvar optikistoj), en aprilo al Okcidenta Ukrainio (ses optikistoj), kaj en junio al Maroko (du optikistoj). Ni povis helpi al centoj da homoj per laŭreceptaj okulvitroj. Kaj en la cetera jarparta programo estos vizitoj al Kongo (septembro) kaj Rusio (novembro). Ĉiam akompanas nin okulspecialistoj, ankaŭ kiam mi deziras konatiĝi kun 'niaj' kvin blindaj militorfoj en Kongo. En la nuna momento ni havas financajn zorgojn ankaŭ pri vidvino en Maŭritanio kun sep infanoj, el kiuj tri estas tute blindaj kaj unu malforte vidanta. La familio ne havas enspezojn, la infanoj devas almozpeti. Ni klopodas helpi al tiu kompatinda familio per transloĝiĝo de fora vilaĝo al la ĉefurbo kie troviĝas blindulejo. 'Evidente' pagos la kostojn de loĝado kaj vivtenado.

Flanke de tio 'Evidente' helpas al la blindulejoj en Tirano (Albanio) per post-elementa instruado kaj en Duŝanbo (Taĝikio) per modernaj lerniloj. Temas pri vere prestiĝaj projektoj.

Forte nin subtenas nia fervora kaj simpatia ambasadoro Bram Bol, la optika industrio, la urbestraro de Heemskerk, la nederlanda organizo 'Sovaĝaj Anseroj', la nialanda Fondaĵo por Vidhandikapitoj kaj la bonfar-projekta revendejo 'La Verda Azeno', en kiu mi kiel volontulo jam duonan eternecon kun plezuro deĵoras.

Antaŭ nelonge tre fidela helpantino



skribis al mi, ke ŝi travivis – danke al la ĉielo sukcese! – sinsekve du katarakt-operaciojn. Kompreneble ŝi ege ĝojis kaj sciigis: *'Nun mi pli bone komprenas kiom granda beno estas via laboro por vidhandikapitaj homoj operacieblaj sed malriĉaj!'*

Se mi iam aŭ iel faris la impreson ke helpo flanke de samideanoj ne estas bonvena, mi tuj forprenu tiun teruran miskomprenon. Kaj mi konfesu, ke mi ricevis jam sufiĉe da leteroj, en kiuj mi legis ke mi estas nobla homo kaj faras laŭdindan laboron... Fakte, por tiel diri, neniu laboro estas pli simpla: serĉu specialiston kaj iru kun ŝi aŭ li al malriĉa lando kie abundas homoj kiuj ŝatus vidi aŭ pli akre vidi! Alia ideo? Ebligu al blinda samideano kun maldika monujo ĉeesti kongreson por blindaj esperantistoj! Skribu – nigre aŭ brajle – por aliaj eblaj ideoj kaj sugestoj al Jacques Tuinder, Henegouwenlaan 35, 1966 RH Heemskerk, Nederlando (e-poŝta adreso: zienderogen@casema.nl). Aŭ ĉu vi estas jam ripozanta diligenta kolego?

# Protokolo de la jarkunveno de KELI

## sabaton 7.8.2010, dum la kongreso en Beregdaróc

1. Malfermo – prezidanto Philippe COUSSON, kiu prezentas ĉiujn estraranojn: Philippe COUSSON, Siegfried KRÜGER, Samuel GAILLARD, Els van DIJK, Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS, Bengt Olof ÅRADSSON, Pavel POLNICKÝ, Zoltan SOMHEGYI.

   Ĉeestas 31 membroj kaj 4 gastoj. Komence ni kantas kanton 471.

2. Elekto de protokolantoj. Estis elektitaj: Ruth van Puijenbroek, Els van Dijk kaj Pavel Polnický.
3. Akcepto de la tagordo kun aldonita punkto 12b.
4. Komunikoj ne estis.
5. Funebra memorigo. Ni starante memoras pri niaj membroj:
   Johannes U. Hommes, NL; Espero Koopmans, NL; Dulio Magnani, IT.(IKUE), Bertil Lund, la edzo de Agneta Järlström, SE.
6. Sekretaria raporto estis publikigita en DR.
7. Kasista raporto ankaŭ aperis en DR. Kelkajn klarigojn donis S. Krüger:
   La aktivaĵoj estas la mono sur niaj kontoj ĉe Ing-banko (NL) kaj UEA. La kasista kaso enhavas inter alie la kotizojn ricevitajn dum kongreso. Postuloj

el la librovendado: KELI ricevas 1/4 de la prezo por vendata Biblio. La Preĝlibro de Jelly Koopmans kaj Nia Historio ne estas menciita en la provizo. Karl Heinz Schaeffer transportos nian parton de la Biblio-provizo el la domo de pastro Bernhard Eichkorn al sia hejmo. Fondusoj: estonte ni kunigu la fondusojn en la kapitalo kaj ne plu aparte menciu ilin.

8. Raporto de kaskontrolantoj: Markus Holzäpfel, Norbert Südland, Karl Heinz Schaeffer. Raportas Karl Heinz Schaeffer.

9. Ĉiuj jarraportoj estis akceptitaj.

10. Buĝetoj estis post klarigoj de kasisto S. Krüger akceptitaj

11. Raporto de la redaktoro de Dia Regno Bengt Olof Åradsson. Li informas pri la teĥnika aspekto kaj petas kontribuojn. Estas laŭdo por la bone videbla numero sur la kovrilo kaj por la agrabla aspekto de la revuo.

12a. Elektoj: denove elektita kiel prezidanto Philippe Cousson. Ĉi-jare finis deĵorperiodo de tri estraranoj: Els van Dijk, Jacques Tuinder kaj Samuel Gaillard. Ĉiuj tri estis reelektitaj.
Ĉi-jaraj kaskontrolistoj estis reelektitaj por venonta jaro.

b. Grava evento por nia KELI estas de la estraro proponita ŝanĝo de la jura enskribo. Ĝis nun estas KELI enskribita en Nederlando ĉe la Ĉambro de komerco kaj estonte nia ligo estos jure enskribita nur en Francio. Post la detala klarigo estis tiu ŝanĝo akceptita de 25 membroj el 26 kiuj partoprenas. Same estis akceptita (26 el 26) transkontigo de la liga kapitalo al elektota franca banko, kiu devas havi sian filion en Hungario, ĉar ni kalkulas kun la transdono de la kasisteco al Ágnes Ráczkevy-Eötvös el Budapeŝto.

13. Kongresplanoj:
Ekumena kongreso 2012 okazos en Hungario – organizos ĝin sac. Attila Szép.
2011 – Pavel Polnický proponas organizi venontjaran 61-an KELI kongreson kaj la centjaran datrevenon en baneja urbo Poděbrady – Ĉeĥio (2-9 aŭgusto) 50 km oriente de Praha. Post la detalaj informoj estis lia propono danke akceptita. Estis tuj disdonitaj aliĝiloj kaj kelkaj jam aliĝis kaj pagis kongresan kotizon.

14. Proponoj kaj sugestoj de la membroj: 1) Bengt O. Åradsson prezentis librojn tradukitaj de Gerrit Berveling. 2) La redaktoro metos emblemon por la jubilea jaro sur la kovrilo de Dia Regno.

15. Jarkunvenon fermis prezidanto P. Cousson.

Protokolanto: Pavel Polnický

Kunprotokolantoj: Els van Dijk kaj Ruth van Puijenbroek



# Vojaĝo al mia unua KELI-kongreso

en la jaro 1969

Irén BAGI,HU



En tiu tempo estis kutimo, ke la gefratoj el okcidentaj landoj abonis Dia Regnon por gefratoj el socialismaj landoj. Tiel mi konatiĝis kun kelkaj gefratoj. En la jaro 1968 abonis por mi s-ro Wilhelm Dahlén el Svedio . Mi dankis al li lian bonfaron kaj ni poste korespondadis. Aŭtune li skribis al mi, se mi ŝatus partopreni la KELI-kongreson sekvontjare en Finnlando en Kiljava, li volonte pagos la kongreskotizon por mi, eĉ li invitis min en sian hejmon pasigi kelkajn tagojn post la kongreso. Kiam mi legis la leteron, unue mi tre ĝojis pri tiu invito, sed poste pensis, ke mi sola ne ŝatus vojaĝi, ĉar estas longa vojo, mi ne konas alian fremdan lingvon kaj tio estas mia unua vojaĝo eksterlanden. Mia fratino, kiu laboris ĉe fervojo, kaj povis peti senpagan bileton, diris, ke ŝi volonte akompanos min tiel, ke ŝia amikino ankaŭ vojaĝos kun ni, kaj dum mia kongreso ili vojaĝos al Svedio, Norvegio, kaj poste ni renkontiĝos ie, kaj ni kune vojaĝos hejmen. Mi skribis al s-ro Dahlén nian planon, kaj mi dankis la pagon por mi la kotizon, sed lian inviton al sia hejmo mi ne povis akcepti, ĉar ni vojaĝos hejmen kune. Li baldaŭ respondis, ke kompreneble ni ĉiuj estas invitataj al sia hejmo, por kelkaj tagoj. Mi ne povis imagi, ke ni triope estos gastoj ĉe ili. Ni ĝojis pri tiu invito.

Ni vojaĝis tra Sovetunio ĝis Leningrado. Matene ni alvenis kaj veturis al stacidomo Moskovskaja, ĉar en Budapeŝto oni diris, ke el tiu stacidomo vespere eliras trajno al Helsinki, . Dum la tago ni promenadis en la urbo, vespere ni atendis la trajnon, kiu alvenis, sed ĝi ne al Helsinki iris, sed inverse. Nur matene iras trajno el tiu stacidomo al Helsinki. Do ni iris al atendejo, kiu jam estis plen-plena, eĉ sur la planko kuŝis multaj homoj. En ĉiu horo unu fervojisto venis rigardi nin, ke ni estas tie. Ĉirkaŭ noktomeze kun la fervojisto venis juna viro, kiu hungarlingve laŭte demandis "kie estas la hungaroj?" Ni tuj signis, kaj li venis al ni. Li estis hungara katolika pastro Lajos Kóbor. Li jam antaŭ tri tagoj alvenis al Leningrado kaj ĉiu-nokte en alia stacidomo pasigis la tempon. Iom li parolis ruse kaj facile li komprenis la rusojn. Li ankaŭ venis al la UK kaj al la antaŭ-kongreso. Matene alvenis la trajno, sed nur dormvagonoj estis. Intertempe venis japana grupo, ankaŭ esperantistoj. Lajos tuj iris aranĝi, ke oni donu sidvagonon por ni. Venis sidvagono kaj ni komforte vojaĝis al

Helsinki. Mi parolis kun mia fratino pri la renkontiĝo post la kongreso, ili forveturis kaj mi serĉis la aŭtobus-stacidomon. Tie mi montris paperon, ke al Kiljava mi ŝatus veturi. Unu maljuna virino prenis mian kofron kaj rapide iris, montris, ke mi iru kun ŝi, sed ni vidis, ke mia aŭtobuso jam foriris. Ŝi montris al mi la horloĝon, ke post 2 horoj iros alia aŭtobuso al Kiljava. Tio estis vespere, je la 21a horo, sed suna, kiel ĉe ni posttagmeze. Mia aŭtobuso alvenis antaŭ noktomezo kaj estis ankoraŭ tre hele. Ĉe la haltejo iu juna viro atendis min, sed neniun mi renkontiĝis en la kongresejo, nur matene. Mi neniujn homojn konis, sed mi ĝuis, ke mi povis paroli kun kiu ajn. Persone mi konatiĝis kun s-ro Wilhelm Dahlén, kun kiu mi multe paroladis. Mi konatiĝis ankaŭ kun Tini Putto, Adolf Vestmann, Åke Rossdahl, Adolf Burkhardt, Britta Rehm, Jelly Koopmans, Nel van Iperen, Ni estis ĉirkaŭ 100 personoj.

La temo estis: La moderna mondo defias la kristanan.

Unua temo: La mondo de la sciencistoj (Jelly Koopmans).

Dua temo: La mondo de la anarkiuloj (Dirk de Boer).

Tria temo: La mondo de la intelektuloj. (W.J. Downes).

La gefratoj estis tre afablaj. Ili vidis, ke mi havas nek Biblion, nek kantlibron. Malgrandan novtestamenton donacis al mi la sveda s-ino Astrid Ljungberg kaj malgrandan kantlibron donacis al mi s-ro Lennart Sundman, ankaŭ li svedo.

Mi tre bone sentis min esti kune kun la gefratoj, estis tiel, kiel granda familio.

Al Stokholmo ni veturis longe per ŝipo de Turku dum la tuta nokto. Matene antaŭ la 8a ni alvenis al la haveno, kiu estis apud fervojstacidomo. Tien mi iris por ke mi renkontiĝu kun mia fratino kaj ŝia amikino. Ili jam estis tie, eĉ s-ro Dahlén estis tie. Li veturigis nin per sia aŭtomobilo al sia hejmo. Tie li montris la loĝejon, kaj ankaŭ la fridujon, kiu estis plen-plena de manĝaĵoj. Li montris kiel ni kuiru kaĉon, kiu estis tre bongusta. Li kun sia familio estis en sia somerdomo, do ni estis solaj en la loĝejo. Li diris, ke la enhavon de la fridujo ni devas formanĝi, ĉar ili restos longe en la somerdomo. Unu tagon ni pasigis kun ili en la somerdomo. La urbo Stokholmo estis bela, pura, riĉa urbo kaj tre plaĉis al ni. Post 5 tagoj ni vojaĝis hejmen.

Tiu, mia unua vojaĝo eksterlanden kaj la kongreso en Kiljava, ĉiam estas neforgeseblaj travivaĵoj.

ʗ3



Wilhelm Dahlén (maldekstre kaj Åke Rossdahl en pli malfruaj jaroj

## JARFINO

Baldaŭ ankoraŭ jaro pasis
– nepre senrevene.

Same niaj faroj pasas
sed ne tiel nepre senrevene.

Ni gustos iliajn fruktojn
kaj ĉu ili estos dolĉaj aŭ amaraj

dependas ja de ni –
vi kaj mi – gekaraj

Åke Ahlrén